WIKIPEDIA

Tigraja lingvo

La **tigraja lingvo** (propralingve ትግርኛ, tigriññā, literumata ankaŭ *Tigrinya*, *Tigrigna*, *Tigrina*, *Tigriña*, malpli ofte (anglalingve) *Tigrinian*, *Tigrinyan*), estas semida lingvo parolata en Eritreo kaj Etiopio. Ĝi estas skribata per la etiopa skribo, silaba skribo, skribata de maldekstre al dekstre.

tigraja	
ትግርኛ	
Parolata en	Eritreo, Etiopio
Parolantoj	5 800 000
Denaskaj parolantoj	5 milionoj
Skribo	Etiopa alfabeto
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ti
ISO 639-2	tir
ISO 639-3	tir
SIL	TIR (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=tir)
Glottolog	tigr1271
Angla nomo	Tigrinya
Franca nomo	tigrigna
Vikipedio	

Ĝi estas parolata

- de la popolo Tigraja en centra Eritreo, en kiu lando ĝi estas unu el la du ĉefaj lingvoj,
- kaj en la Tigrea Regiono de Etiopio, kie la parolantoj nomiĝas "Tigre" kaj la lingvo estas oficiale rekonata,
- kaj inter elmigrintoj el tiuj regionoj
  - inkluzive iujn el la Beta Israel nun loĝantajn en Israelo.

Oni distingu inter la **tigraja lingvo** kaj la parenca **tigrea lingvo**, parolata en la malaltaj regionoj en Eritreo norde kaj okcidente de la regiono kie paroliĝas la tigraja.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tigraja_lingvo&oldid=5042082"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 12:24, 11 mar. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.